

Rainer Maria Rilke,

## Aŭtuno

*tradukita de Manfred Retzlaff*

Folioj kvazaŭ el la malproksim'  
- ĉu velkas enĉiele jen ĝardenoj? -  
faladas kun gestad' neanta;  
la peza Tero estas subiĝanta  
en la solecon el stelar-senlim'.

Ne estas en la mondo viv' sen fin'.  
Ja falas ĉiu mano. Tamen sciu,  
ke regas super ĉio Iu, kiu  
en Sia man' mildege tenas nin.

*Traduko de la Germana poemo "Herbst" de RAINER MARIA RILKE (Rajnero Mario Rilko, \*1875-12-04 - †1926-12-29) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (\*1938-11-04) en 1996-09-26.*

*MR-287-1 / Arg-773-1550 (2014-11-06 13:16:30)*

Rainer Maria Rilke,

## Aŭtuno

*tradukita de Cezar*

Folioj falas iel el la for',  
jen kvazaŭ velkus en ĉiel' ĝardenoj.  
Faladas ili kun neanta gesto.  
Kaj nokte sinkas peza ter' sen resto  
el ĉiuj steloj al solec' en hor'.

Ni ĉiuj falas. Jen ĉi man' dum fal'.  
Aliajn vidu, samas ja ĉe ĉiu.  
Kaj tamen estas iu, tenas tiu  
tenere ĉion softe dum la fal'.

*Traduko de la Germana poemo "Herbst" de RAINER MARIA RILKE (Rajnero Mario Rilko, \*1875-12-04 - †1926-12-29) en Esperanton de CEZAR (civila nomo: Hans-Georg Kaiser, \*1954-05-21).*

*Arg-773-2256 (2015-01-22 12:16:31)*

*Tiu ĉi poem-traduko troviĝas en <http://www.ipernity.com/blog/cezar/605953>.*